A l'instigation de l'UNESCO, dans le cadre de "**La décennie de l'Education à la Paix**", un nombre important d'associations nationales et internationales organisent début juin à Paris-La Villatte un "**Salon de la Paix**". L'ESPERANTO se doit d'y participer. Un stand est déjà prévu. De près ou de loin vous pouvez soutenir cette action qui se déroule au seul bénéfice de la Paix. Idées, participation financière, personnes actives sur place sont souhaitées et bienvenues. Des billets d'entrée en prévente -5 €- peuvent être retenus dès maintenant auprès du GAE ( Groupe Action ESPERANTO 95 ), 12 rue du Cdt Cousteau, FR- 95000 BOISEMONT.

Renseignements sur " **La décennie de la Paix** "
www.decennie.org
et aussi
Elisabeth BARBAY ( SAT-Amikaro), Emile MAS espergala@wanadoo.fr, René BALLAGUY
esperanto.95@wanadoo.fr






**2004 : Eŭropa Unio** iĝos de 15 al 25 landoj, kaj tiel de 11 oficialaj lingvoj al 20. Sed la lingva aspekto de Eŭropo ankoraŭ ne multe estis pritraktata, kaj kun tiom granda nombro da oficialaj lingvoj, kiel konservi justan plurlingvismon : ĉu ne riskas aperi disiĝo inter *"etaj lingvoj"* kaj *"grandaj lingvoj"* ? kaj kio okazos por ĉiuj neoficialaj lingvoj nomataj *"minoritataj"* ? kiel eviti la lingvajn hegemoniojn, kiuj jam aperas pro celo je efikeco ?

Al ĉiuj, kiuj deziras atesti sian intereson por la lingva kaj kultura diverseco de Eŭropo. Al ĉiuj, kiuj deziras defendi siajn minacatajn radikojn. Al ĉiuj, kiuj pro nescipovo de ĉiuj najbaraj lingvoj, proponas la uzon de internacia lingvo neŭtrala Esperanto kiel komunikilo. Al tiuj ni faras ĉi-inviton.

Partoprenu la 9-an de majo 2004 en Strasburgo en la unua manifestacio EŬROPA BUNTO, kiu estos okazo por fari komunan kaj inter-asocian alvokon favore al justa respekto de la lingva diverseco en Eŭropo.

Ĉi-sube la lastaj progresoj koncerne la eŭropan manifestacion

- Nuntempe, la TTT-ejo http://europa. bunto. free. fr disponeblas en 41 lingvoj !

- La programo de la manifestacio kun **mapo** kaj **horoj** estas nun afiŝita ĉe la paĝo http://europa. bunto. free. fr/programo. htm Estas antaŭvidita interalie **koncerto** de la tuluza kantisto *Jean-Marc Leclerc*, fama en la libro *"Guinness Records"* kiel kantisto en la plej granda nombro da lingvoj

- Pli kaj pli da homoj nin kontaktas ĉiutage por anonci al ni sian partoprenon. Kelkaj el la partoprenontaj asocioj estas afiŝitaj ĉe la paĝo http://europa. bunto. free. fr/asocioj. htm. Se vi deziras, ke ni aldonu ligon ankaŭ al la TTT-ejo de via asocio (aŭ organizaĵo), ne hezitu anonci vin plej frue kiel eble al :

europa. bunto@eraro. com

- Ni starigis reton da kunordigantoj en diversaj landoj kaj regionoj de Europo, kies listo videblas ĉe la paĝo http://europa. bunto. free. fr/kontakto. htm

- Kunveturadoj jam komencas organiziĝi : ekzemple, autobuso 77-persona foriros el Bretonio por iri al Strasburgo, aliaj regionoj aŭ landoj estas proponontaj similajn inicitatojn, kiuj estos anoncitaj ĉe la paĝo http://europa. bunto. free. fr/kunveturado. htm

*Antaŭplezurante renkontiĝi kun vi la 9-an de majo 2004 en Strasburgo, jam post 2 monatoj !*
*Kore salutas, Sébastien ERHARD, ĝenerala kunordiganto de la manifestacio*

INTERNACIA FESTIVALO

# LA 20-a INTERNACIA FESTIVALO en KIEL en norda Germanio 27.12.2003 - 3.1.2004 Kadra temo: Rusio

Por partopreni la jubilean 20an Internacian Festivalon fine de 2003 ja necesis veturi ĝis tute norda Germanio, al la haven-urbo KIEL ĉe la fjordo de la Balta maro. Tamen la vetero estis relative milda sen neĝo kaj frosto en la unuaj tagoj. Sed kio ja estas tiu tradicia Internacia Festivalo, kiu jam atingis la 20an jaron? Ĝi estas simple Internacia Esperanto-ferio-semajno, dum kiu kunvenas gesamideanoj, familioj el diversaj landoj por kune ĝui feriojn, interesajn prelegojn, agrablan kaj amikan etoson. Por kune festi la transiron al la nova jaro en amika internacia Esperanto-rondoj, amuze, gaje kaj solene. La majstro de tiu aranĝo estas la senlaca organizanto Hans-Dieter Platz, kiun oni pli amike nomas HDP (hodopo). Li organizas tute profesie kun multe da entuziasmo tiujn Internaciajn Festivalojn kaj meritas la laŭdojn de la partoprenantoj.


Oraj kantoj el Rusio entuziasmigis la publikon

**ДОБРО ПОЖАЛОВАТЬ В КИЛЬ!**
BONVENON EN KIEL !

Ĉi-foje aliĝis 200 partoprenantoj el 21 landoj. La ĉefa temo estis Rusio. Jam dum la unua akcepta vespere oni proponis al ni bongustajn rusojn manĝaĵojn. Poste Harald Schicke kaj Hans-Dieter Platz bonvenigis nin por la solena inaŭguro per ŝaŭm-vino kaj anoncis tombolon kun valoraj premioj, la unua premio estis senpaga partopreno al IF.

Pluraj prelegoj temis pri Rusio, ĝia kulturo, skribo, tradicio, kutimoj ktp. El Uzbekio samideano Anatoli Ionesov tre interese prelegis helpe de lumbildoj pri Samarkando kaj ties internacia pac-muzeo ligita al Esperanto. Aliaj prelegoj temis pri Baltio, Dagestano, naturkuracado edukado al demokratio, scienco-ludo-instruado, komputilado, ktp. La elekteblecoj estis tre vastaj kaj ofte necesis rezigni pri unu aŭ alia interesa prelego por elekti alian.

En la vesperoj ni ĝuis la talenton de la rusaj kantistoj. Inter ili Elena Puĥova (Ĉeĥio) Mikaelo Bronŝtejn, Andrej kaj Kirill Obrezkov, Evilina Sokolova, Oraj kantoj el Rusio. Ankaŭ koncertis Ĵomart kaj Nataŝa el Kazaĥio (nun loĝantaj en Svedio). Post tiuj oficialaj programeroj la IF-trinkejo, la knajpo, restis malfermita ĝis malfrue en la mateno. Ĉi-jare ĝi proponis ankaŭ rusajn trinkaĵojn, bieron kaj limonadon "Baltika" sed ankaŭ koktelojn kun Esperanto-nomo, kiel "ruĝulino", "verdulino", "virgulino" ktp.

Ekestis diversaj rondoj por kune trinki, babili kaj ankaŭ ludi per plej diversaj societaj


ĉe komputilo

ludoj. Ĉe iuj tabloj sonis la gitaroj kaj ariĝis kantemuloj. Alia fenomeno, pli kaj pli da partoprenantoj kunportis siajn teko-komputilojn kaj tiel ĉe iuj tabloj oni interŝanĝis dokumentojn, fotojn, programojn kaj spertojn pri la uzado de komputiloj.

En la posttagmezo estis ankaŭ proponitaj promenadoj al la urbo aŭ al proksima kvartalo. La vetero estis favora por tiaj promenadoj ĉar nur malofte pluvis. La IF-domo estis relative proksime de la ŝip-haveno. Certe ĝi estis malpli impona ol lastjare en Borken (kie ni troviĝis en ĉarma kastelo). Sed la loĝ-ĉambroj estis proksimaj kaj facile alireblaj. En la 3 salonoj de la suba etaĝo okazis la diversaj prelegoj. (Kelkfoje kun ioma reciproka ĝeno). Por iuj programoj kaj ĉefe por la silvestra vespero la 3 salonoj iĝis granda kaj bela salonego, kiu povis akcepti ĉiujn partoprenantojn. La memservejo estis iom malgranda kaj ne-racie organizita. Necesis adaptiĝi kaj iom ĵongli por teni pleton, glason, kaj ĝin plenigi per teo aŭ akvo.

Por la tuttaga ekskurso ni veturis per aŭtobuso al la ĉarma urbo Lübeck. Ĝi estas fama pro la marcipano farita per sukero kaj migdaloj. Ni manĝis en la komforta restoracio de la fama kafejo Niederegger, kaj pli poste vizitis ties muzeon pri marcipano. La kafejo kaj vendejo ĉiam plenplenis. La vetero estis tre favora kaj ebligis fari agrablan viziton en la urbo. D-ro Werner Bormann estis nia tre sperta ĉiĉerono.


En Lübeck

Same, kiel en Borken Danuta Leyk el Pollando proponis ekzerci pri parada danco polonezo. Dudeko da paroj akceptis tion, kaj sukcesis tre impone malfermi la silvestran dancvesperon. Ni parade eniris la grandan salonon kaj ĉe la fino ricevis varmajn aplaŭdojn de la ceteraj partoprenantoj. La granda kela salono estis tre taŭga por tiu lasta vespero de la


Danuta Leyk ekzercigas polonezon

jaro. La manĝoj ja ne estis speciale bongustaj kaj neĝusta-vice prezentitaj. Sed ni tamen ĝuis agrablan silvestran vesperon. Dum tiu vespero oni bondeziris la novan jaron ne nur je noktomezo, sed ankaŭ je la 22a, 23a kaj je la 1a kiam en la landoj de iuj partoprenantoj okazis la jarŝanĝo. Sed kiam ekestis noktomezo, tiam ĉiuj interŝanĝis bondezirojn per tostado de glasoj kaj ĉefe per interkisado. Jen IF refoje ebligis transiri al la nova jaro kaj ĝui dancadon ĝis la 6a matene.

La unuan de januaro oni refoje proponis la novjaran promenon kun iom da neĝo apud la stratoj. Sed la tagoj pasis kaj ja proksimiĝis la lasta tago. Tamen ĉi-jare mi decidis ankaŭ resti por la plilongiga tago la 3an de januaro. Restis ankoraŭ trideko da partoprenantoj, ni vizitis


Grupo de la plilongiga tago

submaran ŝipon kaj monumenton. La lasta vespero okazis en tre amika rondo, kiun agrabligis diversaj kantemuloj kaj muzikistoj. Certe ankaŭ iom helpis ne tute malplenaj boteloj da vino kaj divers-specaj vodkoj.

HDP jam invitis nin por la 21a IF, kiu refoje okazos en Magdeburg. Surloke jam aliĝis pli ol 30 homoj. Ankaŭ vi estos bonvenaj. Vi trovos informojn pri ĝi en La Informilo.

André Grossmann

# VOJAĜO DE ROBERTO KUENY AL AFRIKO


## Vizito al miaj gelernantoj en Senegalio

Eble scias vi, ke de kvin aŭ ses jaroj mi instruas Esperanton perkoresponde al proksimume trideko da senegaloj ĉefe el Dakaro.

Iam mi ricevis leteron de enloĝanto de Dakaro por "lerni tiun belan lingvon"! Kial ne?

Bonvole, sen subteno de iu asocio de la movado, tute privata decido, mi respondis per sendado de fotokopioj de lecionoj, petante resendon de taskoj, mi korektis kaj resendis k.t.p.

Venis aliaj petoj kaj en 2003 dudeko da gelernantoj sukcesis la lernadon de ĉiuj reguloj. Iam iu invitis min viziti ilin en ilia lando kaj eĉ mi mem ankaŭ deziris ekkoni ilin.





Decidite! Mi forvojaĝis al Dakaro la unuan de novembro 2003. Akceptis min deko da junaj geamikoj eĉ kelkaj iom pli maljunaj jam patroj de granda familio, kiuj sukcese eklernis la lingvon!

Alia lando, aliaj kutimoj, alia viv-maniero, (95% da muzulmanoj, 5% da kristanoj), mi ĵus alvenis dum la fast-periodo de la muzulmanoj: "Ramadan", alia manĝaĵo, atento pri lokaj malsanoj pro moskitoj, daŭra varmeco; mi ekkonis la marŝadon sur sablaj stratoj en la diversaj kvartaloj de Dakaro. Sed la homoj estas afablaj, ili akceptis min tre afable, prizorgis mian restadon, invitis min en siaj familioj. Dum mia dusemajna restado, ĉiu-tage mia gvidanto estis la sama juna enloĝanto; feliĉe por mi, ĉar la kvartaloj, la stratoj de la urbo similis unu la alian. Alia gvidanto nomiĝas Papa (persona nomo) kaj YOUM (familia nomo) . Ni ofte nur traveturis urbon per taksio. Tamen mi spertis du-foje la komunan trafikveturadon: pli malmultekosta, sed iom pli malrapida kaj streĉa! Mi loĝis en simpla sed komforta gastejo, kies responsuloj estas franca paro kun tre, tre afablaj deĵorantoj. Mi nomu ilin: Helena, Filomena, Noela, Maria, Pepe, Petro, Mamadu. Se vi deziras viziti Dakaron, mi konsilas al vi tiun gastejon. Dum kvar tagoj mi spertis ankaŭ la vivon de la lokaj enloĝantoj en la fora kampara vilaĝo de mia gvidanto, apud Thiès, urbo for je sepdek km-oj de Dakaro. Dum mia restado mi ne vizitis la sudan parton de la lando: "Casamance", ĉar mi estis je la dispono de miaj geamikoj de Dakaro mem; ĉio-kaze la alveturado per buso aŭ taksio daŭrus almenaŭ unu tagon, ĉar la trafik-sipo ne plu



"ekzistas"! Mi venis al Senegalio ne nur por turismi sed ĉefe por renkonti homojn. Mi tamen vizitis Gorée-insulon kaj best-parkon. La plej granda parto de miaj gelernantoj estas membroj de kristana asocio YMCA en Dakaro (Uson-devena kristana asocio). Ili organizis renkontojn de dekoj da dakaranoj en sia kunvenejo kaj mi konferencis pri Esperanto kaj per Esperanto. Malfeliĉe ili ne tro flue parolas. Sed per kasedoj kaj vortaroj, kiujn mi kunportis ili deziras pliperfektigi siajn sciojn kaj paroladon, ĉar vere ili ŝatas Esperanton. Ne kredeble, ili havas nefavorajn vivrimedojn, sed ili estas tre studemaj!




Iom malfavorigis mian restadon la fakto, ke mi suferis dum cent-kilometra veturado tra la kamparo, pro la seka grundo-polvo kaj pro la polucio de la ellasgasoj de la veturiloj; iu viruso kaptis min, .... aŭ mi kaptis la viruson; mi forlasis ilin tusante.

Sed kia sperto travivi aliajn kutimojn, morojn! Mi travivis mian restadon kun la enloĝantoj, ne en luksa hotelo, kaj kiom afablaj ili estas (mi ripetas) ĉiam respektemaj, prizorgemaj. Kelkaj YMCA-anoj, esperantistoj, responsas ankaŭ pri alfabetizado en la franca lingvo, ĉar multe da kampar-enloĝantoj, kiuj deziras labori en la ĉefurbo, ne havis la eblecon ĉeesti lernejon en la veprejo. La loka dialekto estas "Wolof" sed ekzistas en Dakaro multe da diversaj etno-anoj, kiuj venas de la suda "Casamance" kaj de najbaraj landoj. Ili komunikas iel ajn, provas studi en la Universitatoj. La nuna responsulo de la Esperanto-grupo en la sino de YMCA-asocio estas "ĵus freŝbakita" apotekisto: François SAGNA. Li deĵoras en sociala sanulejo (dispensario) kaj dum vizitado al lia laborloko mi renkontis kuracistinon, kiu atestis: "Esperanto? Mi jam delonge konas ĝin, mi eklernis per Interreto kaj sukcesis du ekzamenojn per interreto mem". Ha! Kia mirinda surprizo, ĉu ne? Jes, Esperanto enradikiĝas en Afriko. Kelkaj mez-aĝaj lernantoj petis perfektigan pli altnivelan kurson... perkoresponde kompreneble. En la lando mem, do en la ĉefurbo Dakaro, ekzistas oficiala nacia Esperanto-asocio: SEA (Senegal Esperanto-Asocio), kies prezitanto, Alfons DIATTA estas mia persona konato (de UK en Varsovio en 1987). Bedaŭrinde mi ne renkontis lin, ĉar li ne venis al la kunvenejo de YMCA, kiu estis la celejo dum mia restado.



En la Dakara-YMCA-grupo mankas gvidanto pri Esperanto; mi ŝatus instrui al ili per parolata kurso sed mi loĝas en Francio, kie troviĝas pli malmulte da "klientoj".

Roberto



# El nia libroservo

## Informoj




⇒ **La librtoservo atendos vin en Verdun okaze de la 55a regiona staĝo, la 26an/28an de marto 2004. la partoprennantoj de la kurso B povos aĉeti la Metodo 15 surloke.**

⇒ Se vi deziras aĉeti librojn proponatajn en tiu folio, la sendkostoj estos fakturitaj maksimume laŭ la kostoj de la poŝta afranko. Tamen, tiu sendkosto ne superos 3,58 eurojn, sendepende de la nombro de libroj menditaj (tio validas nur por adreso en Francio).

## Resumoj, recenzoj, opinioj...



*⇒ Ĉiu leginto kiu deziras recenzi, priparoli, opinii pri legita libro povas sendi al mi (je la adreso de la libroservo) kelklinian tekston por ke ĝi aperu en tiu rubriko en venonta informilo.*




**LA ZAMENHOF STRATO** (Roman Dobrzynski) Ryto Varpas 18,00 €
Agrable leginda libro konsistanta el dialogado inter du konataj homoj de la esperanto movado: Roman Dobrzynski, pola ĵurnalisto kaj Ludoviko Zaleski-Zamenhof, la **«nepo»** de la iniciatinto de Esperanto.
Granda parto de la dialogo prezentas la vivon de la nepo, kiu montriĝas same rimarkinda kiel tiu de la avo. Unue, instruplena priskribo: kiel feliĉa adolesko, el kiera, monde konata kaj riĉetiĝinta familio kaj kies venonteco anonciĝas sennuba, povas en kelkaj monatoj elsupri kaj fali en la plej mizeran kaj danĝeroplenan situacion. Dank' foje al hazardo, foje al helpo de konatuloj kaj ankaŭ al sia propra kuraĝo, la juna Ludoviko sukcesis ĝustatempe eskapi el la geto de Varsovio kaj al tutcerta ekstermiĝo. Post tiu terura periodo de Dua Mondmilito, Lud. Zaleski-Zamenhof sukcesis fariĝi fama arkitekta inĝeniero, laborinta en Pollando kaj poste en Francio. Interalie, li partoprenis la konstruadon de la Lorena Kruco de Colombey-les-deux-Eglises.
Krom tiun privatan vivon, la dialogo ankaŭ aludas la movadan agadon de la «nepo». Plie S-ro Zaleski-Zamenhof ankaŭ aldonas proprajn sciojn pri la vivo de la avo kaj pri okazaĵoj en la esperanta historio.
Aldoniĝas interesanta interparolo pri diversaj temoj.
Entute libro, kiun oni legas kun plezuro kaj kiu alvenigas al la ideo, ke la nepo fariĝinta avo sukcesis havi meritoplenan vivon!... kaj ni aparte danku lin pri lia afabla ĉeesto je la inaŭguro de la « Place de l'Esperanto » en Bar-le-Duc, antaŭ kelkaj jaroj.


J-L T

## Por mendi librojn:



1. Vi sendas vian mendon
- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)
- per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»
- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 euroj por adreso en Francio))
3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo

# Nove alvenintaj libroj




**<u>Kompleksia medicino kaj saama akupunkturo</u>**, orienta medicino, 276 p, **Puramo Chong** *Kava Pech*, **27,00 €.** Dek ĉapitroj pri korea tradicia medicino.



**<u>La enigmo de la ar@neo</u>,** krimromano, 282 p, **Montagut,** *I.E.M.* **20,10 €.** .En moderna tempo, murdo estas anoncita pere de retpoŝto. Por koni la sekvon de la romano, oni devas tamen legi la libron





**<u>Kaj kiu pravas</u>** Memorspertoj, 362 p **De Zilah** *Pro Esperanto*, **24,00 €** «Memorsperto estas ĝenro, en, kiu oni fenomenologie studadas la genezon kaj disvolviĝon de la intelekta perspektivo homa» (E. De Zilah)




**<u>Aŭdienco</u>** _Teatraĵo, 42p, **Havel,** *Kava Pech* **2,30 €** Teatraĵo de la nuna prezidento de Ĉekio, iam disidento sub komunista reĝimo.




**<u>La skandalo pro Josefo</u>**-Drameca prozaĵo 100p,**Vinar** *Kava Pech* **9,90 €** Ne tradicie prilaborita malnovtestamenta rakonto pri Jozefo. *Verko orignile verkita en esperanto, pli frue tradukita en la japana ol en la ĉeka!*



**<u>Ne nur soldato Ŝvejk</u>**-Romano 250p, **Hasek** *Kava Pech* **9,60 €** Kolekto de rakontoj de verkinto de «Brava soldato Ŝvejk»

## Vortaroj - Instrulibroj - Kantolibro

1 


2 


3 

4 


5 

6 

7 


1: **<u>Baza ĉeĥa konversacio</u>**, 34p, **Chrdlova**, *Kava Pech*,**1,40 €** Por minimuma kono de la ĉeka, el esperanto
2: **<u>Esperanto pro deti</u>**,88p,**Melicharkova**, *Kava Pech*,**4,50 €.** Ĉeka instrulibro por infanoj ankaŭ uzebla de francidoj
3: **<u>Profesia uzo de Esperanto</u>**, 42p, **Chrdle**, *Kava Pech*, **1,80 €.** Rimarkoj kaj konsiloj pri la profesia uzo de Eo
4: **<u>Matematika vortaro</u>**, 236p, **Bavant**, *Kava Pech*, **18,00 €**,.Vortaro kiu donas en esperanto la difinon de 1328 matematikaj vortoj aŭ esprimoj kaj plie entenas oklingvan leksikon kie esperanto ilas kiel ponta lingvo.
5: **<u>Esperanta-ĉeĥa Vortaro</u>** , 250p, **Kraft**, *Kava Pech*, **5,70 €.** 26 000 vortoj tradukitaj.
6: **<u>Ĉeĥa-EsperantaVortaro</u>** ,498 p, **Kraft**, *Kava Pech*, **10,80 €** 23 566 enirejoj 220 472 vortoj
7: **<u>Kantoj por ĝojo</u>**, 66p, **Stanjo**, *Kava Pech*, **4,80 €.** Kolekto de 30 kantoj kun muziknotoj. La libro estis komencita de beaŭrinde forpasinta Stanislava Chrdlova kaj, memore al ŝi, finita de ŝia edzo kun helpo de aliaj sindonemaj esperantistoj

✂.................................................................................................................................................

## MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn: al jena adreso:

| | |
|---|---|
| - | S-ro/ino |
| - | - |
| - | - |
| - | - |
| - | - |

En la Subskribo:

ALIĜILO

# PEKINO

**89-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**
**24-31 julio 2004**
**Pekino, Ĉinio**

**Konstanta adreso:**
89-a UK de Esperanto
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
www.uea.org (eblas aliĝi ankaŭ rete!)

*Kongresa numero:*

*ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON, FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON – BONVOLU TAJPI AŬ SKRIBI PRESLITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.*

**FAMILIA NOMO** ........................................ **VIRO/VIRINO**
*(por alfabeta ordigo)* *(forstreku unu)*

**PERSONA(J) NOMO(J)** ........................................ **UEA-KODO** ________ – ___

**ADRESO** *(nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo)* ........................................

........................................

**LANDO** .................... **TEL. N-RO** *(kun prefikso)* ....................
**PROFESIO / FAKO** .................... **FAKSO** ....................
**NASKIĜDATO** .................... **RETADRESO** ....................

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko. (Aliĝojn sen kotizpago oni ne traktas.)

- ☐ Mi sendas ĉi tiun aliĝilon al mia landa peranto kaj samtempe pagas al tiu (vidu dorse sube).
- ☐ Mi sendas ĉi tiun aliĝilon al la CO en Roterdamo kaj pagas laŭ suba specifo:
  - ☐ al ABN-Amro-konto n-ro 42.69.01.444 en la nomo de la UK (aldonante 7 eŭrojn).
  - ☐ al ĝiro-konto n-ro 627337 Den Haag (aldonante 7 eŭrojn; por nederlandanoj sen kostoj).
  - ☐ per poŝtmandato al la adreso de la UK en Roterdamo.
  - ☐ per ĉeko favore al UK de Esperanto (aldonante 10 eŭrojn).
  - ☐ per Visa/Amex/Mastercard n-ro .................... valida ĝis ....................
  - **!** Visa- kaj Mastercard-kontrolnumero (tri ciferoj, dorse de la karto) .... .... ....
  - ☐ al la poŝtĉekkonto de UEA en ....................(Belgio 000-1631831-97; Germanio 3182 91 509 BLZ 370 100 50 Köln; Svedio 74374-0; Svislando 12-2310-0 Bulle).
  - ☐ el mia UEA-konto, kie estas sufiĉa kredito (bonvolu debeti tie).
- ☐ Mi ne volas ke mia adreso aperu en la Kongresa Libro.

Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto: ....................
Se vi aliĝas kiel handikapulo, ĉu UEA jam havas atestilon? jes / mi kunsendas *(forstreku unu)*
Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorse): ....................

**Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn dorsflanke sur ĉi tiu aliĝilo.**

**DATO** .................... **SUBSKRIBO** ....................

| Por uzo de la administracio / peranto: | |
|---|---|
| *uea-membro en kategorio/jaro* .................... | KOTIZO (vidu dorse) .................... |
| *UEA-spezfolio n-ro:* .................... | DONACO AL KONGRESO .................... |
| *konfirmo de peranto:* .................... | BLINDULA KASO .................... |
| *PAGO EN CO* / *KONFIRMO* | INFANA KONGRESETO .................... |
| | FONDAĴO CANUTO .................... |
| | TRIAMONDA FONDAĴO .................... |
| | VOLONTULA FONDAĴO .................... |
| *notoj* | KOSTOJ (7 aŭ 10 eŭroj) .................... |
| | ENTUTE (en eŭroj) ____ |

# Congrès 2004 de l'espéranto en France

## La Roque • 19 - 24 mai

**INDIVIDUA ALIĜILO**
*Bonvolu sendi tiun aliĝilon kun via pago (per franca ĉeko je nomo de **« Espéranto La Roque »**) al :*
*Sro Daniel MOIRAND*
*(Congrès 2004)*
*18-bis, rue du Maréchal Joffre*
*13100 Aix-en-Provence*

*Supplément à «Le Monde de l'Espéranto» du mois*

*Mi aliĝas al la esperantokongreso 2004 laŭ la subaj kondiĉoj kaj pagas la koncernajn sumojn*

☐S^ro ☐S^ino Familia nomo.................... Antaŭnomo ....................

Naskiĝdato : ..../..../.... Adreso ....................

....................

Poŝto kodo..........Urbo .................... Lando ....................

Tel..........Fakso ..........Retadreso ....................

Mi membras en unu el la partoprenantaj asocioj : ....................(nomo de la asocio)

**MI PAGAS :**

### ALIĜO

Ĝi entenas aliron al la kongresejo, laborgrupojn, prelegojn kaj vesperojn. Ĝi inkluzivas nek loĝadon, nek manĝon, nek turismajn programojn sed transporton inter la kongresejo kaj La Baume.

| | | | |
|---|---|---|---|
| ☐ | Plenkreskulo | 40 € | ........ € |
| ☐ | Subtenanto | 80 € | ........ € |
| ☐ | Junulo sub 30 | 30 € | ........ € |
| ☐ | Studento | 20 € | ........ € |
| ☐ | Krompago post la 28-an de februaro | 10 € | ........ € |
| ☐ | Eksterlandano, infano sub 16 | senpaga | |

SUMO (a) : ........ €

### LOĜADO

Mi mem zorgas pri mia loĝado :
☐ en kampadejo
☐ en hotelo
☐ ĉe privatulo

Mi loĝos en La Baume kaj mi mendas :

| | | | |
|---|---|---|---|
| ☐ | tutan domon | 64 € x ...... noktoj | ........ € |
| ☐ | unu ĉambron | 32 € x ...... noktoj | ........ € |
| ☐ | unu liton en ĉambro | 17 € x ...... noktoj | ........ € |

SUMO (b) : ........ €

### MANĜOJ

Mi antaŭmendas manĝojn en La Baume.

Mi estas vegetarano : ☐ jes ☐ ne

| | 19 | 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Matene | X | 4 € ☐ | 4 € ☐ | 4 € ☐ | 4 € ☐ | 4 € ☐ | ........ € |
| Tagmeze | 11 € ☐ 13 € ☐ | 11 € ☐ 13 € ☐ | 11 € ☐ 13 € ☐ | 11 € ☐ 13 € ☐ | 11 € ☐ 13 € ☐ | 11 € ☐ 13 € ☐ | ........ € |
| Vespere | 11 € ☐ 13 € ☐ | 11 € ☐ 13 € ☐ | X | 11 € ☐ 13 € ☐ | 11 € ☐ 13 € ☐ | X | ........ € |
| Bankedo | X | X | 35 € ☐ | X | X | X | ........ € |

SUMO (c) : ........ €

**Ne forgesu plenigi la alian flankon de la aliĝilo !**

## TRANSPORTO

☐ Mi veturos el .................. (urbo) kaj mi proponas...... loko(j)n en mia veturilo

☐ Mi forveturos el La Roque la....-an de majo je la ......... horo

☐ Mi veturos trajne kaj alvenos en Aix / TGV la....-an de majo je la .........horo.

☐ kaj mi uzos la komunan aŭtobuseton de la stacidomo al La Roque d'Anthéron (mi pagas 5 €) ➔ .......... €

☐ Mia trajno forlasos Aix / TGV la ....-an de majo je la.........horo.

☐ kaj mi uzos la komunan aŭtobuseton de la La Roque al la stacidomo (mi pagas 5 €) ➔ .......... €

☐ Mi alvenos aviadile la.... -an de majo je la ......... horo

☐ kaj mi haltos en Aix / TGV je la .......horo por uzi la aŭtobuseton de la stacidomo al La Roque (mi pagas 5 €) ➔ .......... €

☐ Mia avialido forlasos Marseille-Provence la .......-an de majo je la .......horo.

☐ kaj mi uzos la komunan aŭtobuseton de La Roque al la stacidomo Aix / TGV (mi pagas 5 €) ➔ .......... €

? ☐ Mi ankoraŭ ne scias kiel mi veturos sed mi zorgos mem pri mia alveno kaj foriro. Mi intencas alveni en La Roque d'Anthéron la......- an de majo je la...... horo kaj foriri la ....– an de majo je la ....... horo.

☐ En La Roque d'Anthéron, mi nepre uzos la komunan aŭtobuseton, senpage.

**MI PAGAS :**

**SUMO (d) :** .......... €

## EKSKURSOJ

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| ☐ | Ekskurso al Marseille (la 21-an) | Nur aŭtobuso | 14 € | .......... € |
| | kun tagmanĝo, ŝippromenado kaj vizito de If kastelo | | 42 € | .......... € |
| ☐ | Vizito de Silvacane (la 23-an matene) | | 6 € | .......... € |
| ☐ | Ekskurso al Aix-en-Provence (la 23-an postagmeze) | | 11 € | .......... € |
| ☐ | Ekskurso al Avignon (la 24-an matene) | | 27 € | .......... € |

**SUMO (e) :** .......... €

## EKZAMENOJ

Mi aliĝas kaj pagos surloke

☐ Atesto pri supera lernado

☐ Atesto pri lernado

☐ Parola parto de Kapableco

La Informilo 24

**Mi sendas ĉekon laŭ la jena sumo, kun mia aliĝilo.**

*Bonvolu noti, ke via aliĝo validos nur post ricevo de via pago.*

**Dato :** **Subskribo :**

**SUME a+b+c+d+e** .......... €

**La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la jena grupigo:**

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorioj B kaj C;

B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo, kaj ĉiuj landoj de Afriko kaj Latina Ameriko;

C: Ĉinio, kaj ĉiuj aliaj aziaj landoj kaj regionoj escepte de Japanio, Koreio, Honkongo, Singapuro, Israelo, Tajvano (kategorio A) kaj Rusio (kategorio B).

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Bulteno, aŭ en la reto ĉe www.uea.org/esperanto/servoj/membrigh/perantoj.html; ankaŭ pluraj aliaj informoj pri la Kongreso aperas en la UEA-paĝoj). La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 2004. Post tiam, oni aliĝu surloke dum la UK.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE LEGI LA ĈI-PAĜAJN KLARIGOJN.

| **KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ:** (ĉiuj en eŭroj) | **ĝis 31 dec. 03** 1-a periodo | | | **ĝis 31 marto 04** 2-a periodo | | | **ekde 1 aprilo 04** 3-a periodo | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **Aliĝkategorio** | A | B | C | A | B | C | A | B | C |
| 1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG): | 150 | 115 | 60 | 190 | 140 | 70 | 230 | 170 | 85 |
| 2. ne individua membro de UEA | 190 | 140 | 70 | 235 | 175 | 85 | 280 | 210 | 105 |
| 3. komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA | 75 | 60 | 30 | 85 | 70 | 35 | 115 | 85 | 45 |
| 4. kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA | 115 | 85 | 45 | 140 | 105 | 55 | 170 | 130 | 65 |

**DIFINOJ**

**Individua membro de UEA:** Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Ne temas pri Aligitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*
**Komitatano:** Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo.
**Kunulo:** Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon, kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.
**Junulo:** Tiu, kiu naskiĝis inter 74 01 01 kaj 83 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.
**Handikapulo:** Tiu, kies handikapo nepre postulas akompananton (ekzemple blindulo), kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo, kiu klare indikas la tipon de handikapo.

**Senpage aliĝas:**
– infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 83 12 31;
– nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

**La kotizo ne estas repagebla,** senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

**La kotizo ne inkluzivas** loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.


**Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.**

**Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.**

**Kongresa Regularo** (ekstrakto): *"8. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK."*

Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton al la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.

**! Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.**
**Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.**



# REAGOJ

...de Maurice Sujet ( msujet@club-internet.fr )
au: ( courrier-des-lecteurs@lemonde.fr )
Objet: *Novlangue.*

L'article de B. Poirot-Delpesch dans *LE MONDE* du 25 fév. 2004 dénonce l'usage, à tous les niveaux de la société, d'une *"novlangue"*, instable et éphémère, que d'autres ont qualifié de *"bouillie de paroles"*, et dont *"les tics"* ne font que souligner le déficit de signification. Le jugement est sévère mais juste : il s'agit bien d'une *"évolution vers une absence de contenu et de style"*.

Les artisans de cette dérive sont bien les "parleurs" et publicitaires des radios et télévisions publiques ou privées, car ils sont imités, quelquefois inconsciemment, par leurs auditeurs et spectateurs, leur influence ne se limitant pas hélas aux moins éduqués puisqu'elle atteint journalistes et hommes politiques. L'intérêt porté à des faits anecdotiques plutôt qu'à de grand thèmes d'intérêt général, la recherche constante de "tendances" renouvelées de la langue qui bafouent les règles ou les usages, sont les caractéristiques de ces nouveaux professeurs de langue.

Parmi ces "tendances" qui contribuent à rendre inintelligibles à beaucoup les propos ou les écrits de ces nouveaux prétendus modèles on trouve bien évidemment l'abus de mots anglais ou pseudo-anglais totalement inutiles, sans compter l'adoption, moins visible mais de plus en plus fréquente, de calques de mots ainsi que de structures anglaises étrangères à notre langue. Entendrons-nous bientôt dire "le jaune chien" et y aura-t-il confusion entre " le grand homme" et " l'homme grand"?

Ce danger n'a pas échappé à votre Médiateur qui a rappelé dans sa dernière chronique qu'il est toujours recommandé aux journalistes de traduire en français les mots étrangers, car les lecteurs qui ne sont pas nécessairement des spécialistes de l'anglais (ou de ses argots) ne sont pas toujours en état de les comprendre, Et fort sagement il a conclu par cette phrase : *"Cette règle est censée s'appliquer à tous les mots étrangers, et ON NE VOIT PAS POURQUOI L'ANGLAIS, QUI ENVAHIT LES COLONNES DU JOURNAL, Y FERAIT EXCEPTION"*.

Les lecteurs ne le comprennent pas plus que lui quand ils lisent sur leur journal ou sur leur écran d'ordinateur bien des mots d'anglais inutiles, comme *"le Desk"* et *"les News"* pour *"les very informed people"*, en quoi ces mots sont-ils préférables à: *le Bureau*, et *les Nouvelles* pour *les gens bien informés*? La seule raison n'en est-elle pas un snobisme généralisé devenu inconscient.

Certains ennemis de la langue française n'en continuent pas moins de qualifier, dans leurs forums anglophones, le français de *"langue barbare, en train de mourir, et que personne veut plus parler"*, y compris certains Français . N'est-il pas paradoxal, malgré cette *"soumission volontaire à l'anglais"*, malgré cet *"à plat-ventrisme des Français devant l'anglo-américain"* dénoncé par Denise Bombardier chez Bernard Pivot, de lire dans le TIMES il y a quelques semaines un article où son auteur parle de *"LA FEROCE RESISTANCE DES FRANCAIS A L'EMPLOI DE LA LANGUE ANGLAISE"* sans préciser qu'ainsi les anglo-saxons s'assureraient à moindre coût (pour eux seuls) leur hégémonie linguistique, politique et économique... David Rothkopf conseiller de présidents états-uniens n'a-t-il pas écrit un article intitulé *"Praise of linguistic imperialism"?* dans lequel il vise au monopole des communications. *Ğ Blame the victim" est* semble-t-il un principe toujours efficace.

Serons-nous bientôt totalement incapables de parler à égalité dans les instances internationales et même incapables de nous comprendre entre Français, lorsque un snobisme galopant, inconscient ou infantile, fera que nombre d'articles ou d'émissions ne seront plus compris par ceux qui maîtrisent la seule langue française ?...

Maurice Sujet (77320 Jouy-sur-Morin)

## ... *appeler un chat un chat...* ou comment "Libé" retombe sur ses pattes ( pieds !... )



NB - ... de la rédaction de "La informilo" : Plus d'un de nos lecteurs sera sans doute perplexe à la lecture du titre de l'article ci-dessous... Il est vrai qu'à ce cadeau dédié aux internautes branchés ( faut être dans le vent, n'est-ce pas ?... ) répond un peu plus bas celui octroyé aux francophones ( rétro ?...) qui répugnent à envoyer des mails... Il est vrai que la perplexité subsisterait après consultation du "Petit Larousse"... En effet, à quoi pourrait bien servir l'envoi d'un... *petit maillet*... définition du dictionnaire précité !...

## Un chat avec Victor de la Serna du quotidien El Mundo

La rédaction de Libération a reçu de nombreux témoignages de Madrilènes et d'habitants d'autres régions d'Espagne.

Par Libération.fr
vendredi 12 mars 2004 (Liberation.fr - 13:03)

La rédaction de Libération a reçu de nombreux témoignages de Madrilènes et d'habitants d'autres régions d'Espagne. Nous avons choisi de publier certains d'entre eux. Avec pour seules signatures celles de leurs adresses de **courriels**, que nous avons choisi de ne pas faire apparaître. Les voici.

# LA 26-a ĈEBALTA ESPERANTISTA PRINTEMPO, MIELNO (Pollando) 15.06.—23.06. 2004

# INFORMILO

# INVITILO

**KARAJ GESAMIDEANOJ, ne perdu la okazon, venu MIELNON kaj partoprenu la 26-an ĈEBALTAN ESPERANTISTAN PRINTEMPON.**

La aranĝo impresos vin forte pro neripetebla esperantista etoso kaj ria E-programo. Ĝi donos al vi bonegan okazon por profundigi vian lingvokonon, ligi novajn amikajn kontaktojn kai agrable pasigi la tempon ĉe la Balta Maro. **Tre interesa por ĉiuj estos ankaŭ la ekskurso al Nexo (BORNHOLM)** kaj renkonto tie kun danaj esperantistoj. **Oni povas kontaktiĝi kun ĈEP-organizanto per leteroj, telefone aŭ rete.**

**Aliĝilo havebla ĉe:**
**KORESPONDADRESO:**
POLA ESPERANTO-ASOCIO,
BOX 30, 75-016 Koszalin-1
Pollando,
**TELEFONO:** 094 / 3404-563 ( petu S-ron BARANOWSKI ).
**POŜTELEFONO AL ĈEP ORGANIZANTO:** +48 / (0) 503-417-825.
**RETADRESOJ:**
barslavo@poczta.onet.pl aŭ
barslavo@wp.pl

**ORGANIZA KOMITATO**

Pola Esperanto-Asocio Filio en KOSZALIN organizas **en la tagoj 15-23 de junio 2004 jaro la 26-an ĈEBALTAN ESPERANTISTAN PRINTEMPON** kun riĉa kaj varia E-PROGRAMO. Tiu ĉi internacia E-aranĝo okazos en la atrakcia kaj ĉarmoplena ripozloko MIELNO, pitoreske situanta inter BALTA MARO kaj JAMNO – lago, 12 km nordokcidente de la distrikta kaj vizitinda urbo KOSZALIN. **Pri atrakcio de MIELNO decidas ĉefe la naturaj valoroj:** sabloriĉa strando kun altiĝantaj dunoj, verda strio de pinarbaro, granda lago kaj saniga mikroklimato kun aero saturita de jodo. Ne mankas en Mielno distraĵoj, oni povas tie agrable sin amuzi.

**LA PROGRAMO de la 26-a ĈEP antaŭvidas:** interesajn prelegojn kun videofilmoj, konkursojn kun valoraj premioj, ekskursojn al vizitindaj lokoj, ĉiutagan kantadon, dancadon kaj lingvoperefektigadon. Por volontuloj, havantaj validajn pasportojn, okazos tuttaga ekskurso per komforta flugŝipo al havenurbo **NEXO (BORNHOLM). Tiu ĉi plezuro (aparte pagenda) kostos ĉ.40 € (170 zlotojn).** En **Mielno** ĉiu havos sufiĉe da tempo por agrable promeni kaj sunumi, ankaŭ sur la proksima naturista strando. Ebias naĝi ne nur en la maro, sed ankaŭ en du tegitaj naĝejoj kun varmigata marakvo.Oni povas ankaŭ malmultekoste pruntepreni biciklon por viziti la regionon.

**Esperantistoj el diversaj landoj havos okazon prezenti propran programon.** Ni petas kunporti al MIELNO diversajn esperantaĵojn, sonkasedojn kun belaj kanzonoj, E-videofilmojn, ktp.ktp. **Estas planata eta aŭkcio de esperantaĵoj.**

**LOĜLOKO: GASTAMA RIPOZCENTRO de POPOLAJ SPORTTEAMOJ.**
**ADRESO:** 76-032 MIELNO, str. Mickiewicza 3. **tel.** 094 / 3189-539.
**LA RIPOZCENTRO**, konsistanta el **5 duetaĝaj domoj kun sunterasoj**, estas ĉirkaŭbarita kaj garantias al aŭtoposedantoj sekuran aŭtoparkon. Ĝi situas **ĉ. 150 m** de JAMNO-lago kaj **ĉ. 70 m de la strando.**
**LOĜKONDIĈOJ: Loĝado nur en dulitaj**, bone ekipitaj ĉambroj kun propraj lavujoj. En ĉiu koridoro estas **4 ĉambroj** kaj **2** duŝejoj, eblas saŭni, bilardi, kafumi ktp.
**SURLOKE TROVIĜAS**: belega manĝejo, kunvenejo, diskejo, eta bufedo kaj floromamita korto kun multaj sidlokoj por ripozi, babili kaj kanti. **Se iu volas nepre loĝi sola, devas pagi aldone 60 € por la dua libera lito.**
**PARTOPRENKOTIZO:** inkluzivas oportunan loĝadon, bongustajn manĝojn ( **tri manĝoj potage** ), kongresajn materialojn, kaj riĉan esperantan programon, **sed nenian sanasekuron.**

**PARTOPRENKOTIZO VARIAS DEPENDE de ALIĜTEMPO kaj egalas al:**

| A | B | | |
|---|---|---|---|
| -130 eŭro | 210 eŭro | (aŭ egalvaloro ) - | aliĝo ĝis la 30.03.2004 jaro |
| -140 eŭro | 220 eŭro | (aŭ egalvaloro ) - | aliĝo ĝis la 30.04.2004 jaro |
| -150 eŭro | 230 eŭro | (aŭ egalvaloro) - | aliĝo ĝis la **30.05.2004 jaro** |

TARIFO: A – **por samideanoj el ekssocialismaj landoj,**
B – **por esperantistoj el ceteraj landoj (ankaŭ el iama GDR),**

**ATENTON : Post la 30-a de majo 2004 jaro** organizantoj ne garantias akcepton de aliĝiloj. **Ĉiu aliĝinto devas pagi plenan partoprenkotizon, sendepende de tio, kiom da tagoj daŭros lia restado en MIELNO. Antaŭpago ne estas repagebla!!!**


**ALIĜMANIERO :** Oni devas precize plenigi **apartan aliĝilon** kaj resendi ĝin kiel eble plej frue al ĈEP- ORGANIZANTOJ.
Ĉiuj aliĝantoj el Pollando devas ĝiri antaŭpagon de **100 PLN (polaj zlotoj)** en la banko-konton de Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin (**vidu aliĝilon por poloj).**

**La aranĝo komenciĝos de la tagmanĝo (la 15-an de junio) kaj finiĝos post la matenmanĝo (la 23-an de junio). (novaĵo).**

**ALVENO : Ni petas veni MIELNON la 15-an de junio antaŭtagmeze,** nur eksterlandanoj kaj polaj esperantistoj loĝantaj malproksime de Mielno povas veni pli frue, **t.e. la 14-an de junio en la horoj 16.00 – 24.00.**
**FORVETURO: la 23-an de junio antaŭtagmeze** ( eblas forveturi post la tagmanĝo-aparte pagenda en la manĝejo).
**MIELNO estas facile atingebla per diversaj trafikiloj.** De KOSZALIN al MIELNO cirkulas urba buso **N-ro 1 ( BUSHALTEJO** – troviĝas apud koŝalina stacidomo ).
En **MIELNO** oni devas elaŭtobusiĝi ĉe **la tria** bushaltejo kaj post dekkelkaj paŝoj iri maldekstren, laŭ nia direktomontrilo kun VERDA STELO. Oni povas veni MIELNON ankaŭ per unu el pluraj minibusoj, starantaj ĉe koŝalina stacidomo. Se estos kun vi almenaŭ unu esperantist/-in/o, mikrobuso pretos transporti vin al SPORTA HOTELO.

# KALEJDOSKOPO

## Nupto en Esperanto



Stano Marcek raportis la 7-an de marto 2004:

Sabate la 6-an de marto geedziĝis en la slovaka urbo Poprad la Ĝenerala direktoro de UEA **Trevor Steel** (Aŭstraliano) kaj **Katarina Bodnarova** (Slovakino). La oficiala geedziĝa ceremonio okazis en du lingvoj: la slovaka kaj Esperanto. Fotoj haveblas (rete) ĉe: marcek@esperanto. sk

## Amsterdamaj studentoj al Pekino

*Wim Jansen raportis la 5-an de marto 2004:*

Ĉi-somere, la universitato de Amsterdamo, Nederlando, sendos du studentojn pri lingvistiko al la **Universala Kongreso** en Pekino por la plenumo de surloka esplortasko rilate la intonacian fenomenon en Esperanto.

La studenta duopo venkis konkurson, kies premio estas la staĝovojaĝo al la UK. La Amsterdama universitato jam antaŭ unu jaro agnoskis la Universalajn Kongresojn kiel formalan staĝejon. Per sia esplorraporto la studentoj akiros kreditpoentojn konforme al la normalaj universitataj reguloj

## Esperantistaj medicinistoj en Pekino

umea raportis la 5-an de marto 2004:

**Universala Medicina Esperanto-Asocio** (UMEA) jam organizas sian dumkongresan programon en Pekino.Post la jarkunveno okazos vizito de iu medicina instituto, kliniko au farmacia fabriko. Dum la jarkunveno okazos decido, kie estos venontjare la Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (IMEK). Anstataŭ Francio kandidatiĝas du urboj: Plovdiv (Bulgario) kaj Opava (Ĉeĥio). La Estraro varbas medicinistojn el pluraj aziaj landoj kaj el Suda Ameriko.

UMEA festos en 2008 sian 100-jaran fondiĝdatrevenon !... La Estraro jam pretigas la programon por inde festi.

*D-ro Imre Ferenczy,prezidanto de UMEA*

## ... Vi ne povos kongresi en PEKINO (U.E.A.)... nek en BRATISLAVO (SAT)... jen por vi..



**12a Internacia Esperanto-semajno de la kulturo kaj turismo**

**SALOU ( Tarragona ) Hispanio**

de la 2a ĝis la 9a de oktobro 2004

sub aùspicoj de Hispana Esperanto-Muzeo

---

**... En la provizora programo**: prelegoj, Eo-kursoj, distraj vesperoj, debatoj, muziko, opero-vidbendoj, poetika angulo, teatra scenigo, ekskursoj...


**Via hotelo** "San Francisco", str. Amposta n° 5, situas en la urbo-centro, 150 metrojn por atingi la strandon!

**Novaĵo**: En la kadro de la "semajno" oni starigos *"Premion Ada Sirkorska"*, al kiu povas kandidati ĉiu esperantist(in)o, aù esti proponata de Eo-klubo, Grupo, Asocio...

Pluaj informoj kaj aligilo ĉe :

**Luis Serrano Pérez**, Apartat 423, ES-08200 SABADELL luis-serrano@mixmail.com

Vizitu ankaù la hejm-TTT paĝon http://www.terra.es/personal5/lserrano2003



## *BETSCHDORF*

Espéranto
35 Grande-rue
67660 Betschdorf

… Post pluraj jaroj da kunlaboro al la revuo "La Domo", kiu cetere centrigas draste siajn strebojn al pli fakaj temoj, avinjo Odette, laŭ instigo de la citita revuo, eniras "angulo"-n de "La Informilo" por daŭre salivigi nin per regionaj receptoj… Jen do la unua en niaj kolumnoj…



### cepoj kaj ovoj / fonduo



Vi bezonas; 1 kg senĉelitajn cepojn
1 sup-kuleron da faruno
100 g da butero
freŝa kremo (ĉirkaŭ 200 g)
po 1... 2 malmole kuirita(j) ovo(j) por unu persono
1 glaso da lakto
mem-muelita „kajana pipro"

... Oni kalkulas po 5 sup-kuleroj da cepoj por unu persono...
- Lasu la cepojn fandi en butero ( *blondigu* ilin )
- Aldonu supkuleron da faruno en kaserolon, *malsekigu* ĝin per kelkaj sup-kuleroj da malvarma lakto, evitante grumelojn. Lasu kuiri per milda fajro. Aldonu 3 kulerojn da freŝa kremo...
- Bonmiksu la tutaĵon ĝis elĉerpiĝo de la kremo... Oni obtenu ne tro likvan saŭcon, al kiu oni aldonu la malmolajn ovojn tranĉitajn en sufiĉe dikajn rondpecoj.
- Servu kun terpomoj vestitaj en *kamporobo,* bonvarme tenitaj en plado kovrita per tuko...

Ĉiu senĉeligu siajn terpomojn!... Bonan apetiton!

Tiu recepto estas citita ek de mezepoko en *Val de Villé*. Oni servas tiun fonduon post terpom-supo, akompanata de kaprin-fromaĝo kaj glaso da... *Williams Piro* !... Modere konsumi !!

## "Aspirado al Lumo" el Vjetnamo



Estas en **Hanojo** muzika klubo de blinduloj nomiĝanta *"Aspirado al Lumo"*, kiu fondiĝis antaŭ 5 jaroj. Ĝi havas pli ol 10 membrojn kaj 6 el ili estas anoj de la E-kurso okazigita en pasinta julio. La kursanoj ŝatas kaj povas kanti esperante. Ili jam kantis esperante en la tria *Printempa Renkontiĝo* okazigita de Vjetnama landa asocio en marto 2003 en Hanojo.

Esperantista emerita kuracisto kaj *Nguyen Thi Ngoc Lan* kune gvidas tiun kurson.

La kursgvidantoj serĉas brajlajn muzikaĵojn de kelkaj E-kantoj, por ke la lernantoj povu kanti post kiam ili lernos la brajlajn tekstojn.

Nguyen petas helpon, kaj pro tio lanĉas alvokon por havigi al la muzika klubo "Aspirado al Lumo" brajlajn kantotekstojn.

Helpemuloj kontaktu Nguyen Thi Ngoc Lan ĉe:*"Aspirado al Lumo-Nguyen Thi Ngoc lan"*

⇨ ngnglan@hotmail. com ⇦

## Internacia Naturkuraca Asocio en Pekino

*Harald Schicke raportis la 6-an de marto 2004:*

Kiel kutime INA havos unu el la plej interesaj fakkunsidoj de UK. INA ne tedas la homojn per babilado, sed interesas ilin pri sano per eksterordinare bonaj prelegoj. Tial INA atingas ĉiujare dum UK multe pli ol 100 homojn. La unuan fojon INA prezentos ekskurson al naturkuraca kliniko. Antaŭvideble ne multaj homoj povos partopreni. Do anoncu vian deziron al la gastlibro de INA je www. esp-ina. com. INA eldonos sian koloran revuon por la Pekina UK kun 52 paĝoj! Ĉiu kongresano kaj kompreneble ĉiu membro ricevos ĝin! Aliĝu al INA kaj profitu por via sano!

# « Vinilkosmo »...Jen la 6a Informletero.

Ĉi monate la ventoblovo venas el Azio, inter alie, per la anonco de UK okazonta en Ĉinio, Novaj KD-referencoj ĉe Vinilkosmo kun **Ĵomart & Nataŝa**, kiuj originas el Kazakstano, **La Mevo,** kiu salutas nin el Japanio, kaj novaĵoj de aliaj artistoj el Vjetnamo, Koreio kaj de alie, kiuj ankoraŭfoje montras al ni ke esperanto ne konas landlimojn kaj ĉiam invitas al vojaĝoj kaj interŝanĝoj.

Ankaŭ vi povos malkovri la espokulturan datenbazon (nun nur Artista datenbazo), kiu estas ĵus definitive lanĉita, en ĝi vi malkovros interalie la oficialan prezentopaĝon de EUROKKA.

Ni petas al ĉiuj artistoj, bandoj, organizantoj, kulturaj aktivuloj, asocioj kaj kluboj inskribiĝi en ĝin por rapide evoluigi tiun gravan ilon cele efikan utiligadon; diskonigu ĝin amplekse.

Por tiuj, kiuj vizitis Vinilkosmo. com antaŭ longe, ne hezitu reveni por malkovri la plej lasta versio de la TTTejo, ĝi estis plibonigita por pli facila uzado kaj pro la kreskanta nombro de novaj referencoj.

Ni esperas kontentigi tiom la porokazaj vizitantoj kiom niajn fidelulojn, kiujn ni dankegas pro iliaj sugestoj kaj subteno :

http://www. vinilkosmo. com

... kaj bonan esploradon !

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

**VINILKOSMO-Novaĵoj**

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

**VKKD 65**

*« Amu min »* **Ĵomart & Nataŝa**



Post elĉerpiĝo de sia fama albumo *« valso por amikoj »*, la duopo origine de Kazaĥio, Ĵomart & Nataŝa regalas nin per nova elstara kaj riĉoplena KD.

La albumo *"Amu min"* prezentas 12 novajn kantojn verkitajn de fama rusa poeto Mikaelo Bronŝtejn.

La melodioj de Ĵomart estas tre kortuŝaj kaj la voĉo de Nataŝa - en kelkaj kantoj - tute fantasta.

La du voĉoj belege akordiĝas garantiante plezuran aŭskultadon kaj reaŭskultadon!

La disko estis registrita kaj miksita en ilia propra studio *"Jomart's Studio"* en Stockholmo.

Ĵomart & Nataŝa jam prezentis kantojn de la nova albumo ĉe RET (Rusio) kaj la 3-a Azia kongreso en Koreio dum somero 2002, ĉe UK kaj IJK (Svedio) -2003 kaj dum IS kaj IF 2003, kie la kantoj kaj la KD estis aparte ege bone akceptitaj de la publiko.

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi : http://www. vinilkosmo. com//?disc=vkkd65&lng=e

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

**VKKD 66**

*« Kompilaĵo »* La MEVO

Jen retrospektiva kompil-albumo de LA MEVO el Yokohamo en Japanio, kiu kunigas en unusola KD ĉiujn verkojn de La Mevo eldonitaj sur kasede de la komenco ĝis nun.

Temas pri la kased-albumoj « La Nomkarto » (1986), « Bluo » (1991), « Vizaĝoj » (1993) kaj remiksita titolo por Vinilkosmo-Kompil' « Flava blankul' » (1995).

La Mevo naskiĝis en 1986 iom antaŭ la Centjara Jubileo de Esperanto, kiam renkontiĝis SAEKI Hirojuki kaj ONO Takao. Post la eldono de la unua kasedo, La Nomkarto, Hirojuki elbandiĝis. MICUJAMA Joŝiro enbandiĝis kaj partoprenis la duan kasedon, Bluo. La Mevo produktis trian albumon, Vizaĝoj, en tiu lasta kased-albumo Takao estas sola, verkas la tekstojn, komponas la muzikon, kaj kantas.

La muziko de La Mevo estas simpla, kun facilaj popritmoj, precipe realigita per komputile mastrumataj sinteziloj, miksitaj kun kordinstrumentoj kaj sekvenciloj.

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi : http://www. vinilkosmo. com//?disc=vkkd66&lng=e

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

**VKKDR 1**

*« Esperanto - A - Z »* Kurso

Jen kompleta esperanto-kurso sur KD-romo, kiu instruos vin komuniki kun la tuta mondo, facile, rapide, kviete:

- kompleta gramatiko en nur 12 lecionoj - kursgvidanto je via dispono, senpage - perfektiga kurso sub formo de romano vortaro kaj vortara trejnado

Plus:

- muzikaĵoj de artistoj eldonitaj de Vinilkosmo! - literaturo eldonprogramo en espéranto - multnombraj informoj kaj ligoj

Tiu ĉi kurso estas realigita en jenaj lingvoj: *nederlanda, franca, angla, germana, hispana, itala, portugala, dana, sveda, kaj norvega.*

Minimuma konfiguro: Windows 95/98/ME/2000/XP, Pentium 100 Mhz, 16 Mb da RAM, 27 Mb da disko-spaco, sonkarto.
http://www. vinilkosmo. com//?disc=vkkdr1&lng=e

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

Vinilkosmo / EUROKKA -Informoj

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

La artista datenbazo - http://artista. ikso. net/

La ideo de tiu ĉi kunlaborprojekto inter TEJO kaj EUROKKA venis antaŭ unu jaro dum esperanto@interreta seminario en Usono.

Ĝi estas ege simpla - temas pri datenbazo de (komence) esperantaj muzikaj artistoj kaj grupoj. Aldone al tio estas informoj pri kiel okazigi koncertojn, spektaklojn kaj similajn aferojn. Ideale ĝi povas helpi aktivulojn, kiuj organizos ekz. koncertojn dum esperanto-aranĝoj aŭ en lokaj kluboj. Ĝi povos ankaŭ utili al esperanto-bandoj por munti turneon, ktp. ĝi ankaŭ utilu kiel spertejo por novaj aktivuloj. Ni nun lanĉis la unuan paŝon, la datenbazon mem http://artista. ikso. net/db/datumbazo. php … sed la paĝaro estas en daŭra evolua stato kaj dum la ontaj semajnoj kaj monatoj aldoniĝos novaj paĝoj. Ni ankaŭ petas vian helpon, nome se vi muzikumas, ke vi enmetu viajn datumojn en la datumbazo. Aldone, ni petas vin ankaŭ veni kun komentoj kaj plibonigoj - ege gravas por ni, ke ĝi estu utila kaj ke vi, kiel uzanto, bone povas labori per ĝi. Dankon! Laste, se vi ŝatus kunlabori en la projekto (kaj enhave kaj programante la paĝaron), ne hezitu kontakti nin ĉe : artistadb@ikso. net David-Emil kaj Flo

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

Per *"Eterna vivo"* PENDUMITO subtenas « *Liberecana Ligilo* »-n

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

PENDUMITO - *"Eterna Vivo"* (demo KD-o)

PENDUMITO estas punk-grupo el Pollando, kiu en sia transdono klopodas disvastigi liberecanajn kaj poresperantajn ideojn. La materialo registrita marte-aŭguste 2003 kaj sendepende eldonita de la bando, enhavas ses kanzonojn: du esperantaj, tri polaj (ankaŭ kun kanzono de malnova pola punk-bando SIEKIERA) kaj unu instrumenta. La muziko de PENDUMITO estas miksaĵo de rapida kaj akra krust-punko kun elementoj de metalo.

Kovrilo de la KD-o enhavas tradukojn de la tekstoj en Esperanto, informojn pri liberecanaj E-iniciatoj kaj poresperantan artikolon pollingve.

Valoras substreki, ke vendado de tiu ĉi disko subtenas E-anarkiistan revuon "Liberecana Ligilo" - aĉetante la diskon, vi rekte helpas al tiu ĉi magazino!

Limigita kvanto disponeblas ĉe Vinilkosmo kontraŭ minimuma pago de 7 Eŭroj + sendokostoj, sed vi povas ankaŭ libere donaci pli da mono por subteni la revuon.

Por tio kontaktu rekte ĉe vinilkosmo@esperanto. org

Vidu ankaŭ TTT-ejon de la revuo :http://www. sers. pandora. be/jakvo/Esperanto/lib. lig. html

Lukaso – PENDUMITO www. pendumito. republika. pl

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

*Krio de Morto* revenas

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

Post longega silento la pola alternativa bando KRIO DE MORTO reeldonis la elĉerpitan diskon *«Martoria »* kiu entenas inter la18 titoloj, 4 en esperanto. Nun *Krio de Morto* preparas novan albumon **tute en esperanto** kaj ĝi promesas esti vere vigla.

Atendante ĝian aperon remalkovru ilian muzikon : http://www. vinilkosmo. com/?disc=vkkd35&lng=e

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

Esperanto-Muziko en Azio

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

*"TAMBA-5 "* el Japanio

*"TAMBA-5 "* estas muzika grupo en Kameoka, Kioto Japanio. Tamba " estas la malnova nomo de la loĝregiono de la muzikistoj de la grupo, kaj estis ankaŭ tre fame konata muzika grupo el Brasilo *"Tamba-4 "*. Tiu ĉi japana Tamba konsistas el 5 muzikistoj kaj do la nomo de la grupo ja estas ŝerco. La bando ludas bosanovon laŭ iliaj aranĝoj, kantas esperante kaj ĉiu Merkrede koncertas en la ĝardeno de restoracio de Kameoka, aŭ kafejo en Kioto. La muzikistoj ne estas profesiaj kaj taksas sin kiel *merkredvesperaj muzikistoj*. . Ĉiuj membroj havas siajn okupojn.

*Tamba 5* ankoraŭ ne surbendigis KDon, sed faris vidbendon de koncerto en la restoracia ĝardeno. La bando sin prezentis por unuafoje antaŭ esperantistoj dum la japana kongreso en pasinta oktobro.

Por rilati kun la bando TAMBA 5, kontaktu Yas Kawamura ĉe : y-kawamura@oomoto. or. jp

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

"Heliko" el Japanio

En apr. 2002, Konisi Gaku fondis kun kunlaborantoj malgrandan miksvoĉan korusgrupon nomatan *"Heliko"*, en la regiono Kansajo (ĉirkaŭ la urboj Osaka, Kioto, kaj Kobe). En la nuna momento ĝi estas unu el la plej aktiva esperantista muzikensemblo en Japanio.

Ĝi konsistas el kelkdekaj membroj, ĉiuj amatoraj, kiuj ekzerciĝas regule unufoje monate.

Heliko jam prezentis sian kantadon en la Japana Esperanto-Kongreso kaj en la loka kongreso en 2002 kaj 2003.

* Repertuaro: Dek-kelkaj kantoj, el kiuj pli ol duono estas **japanaj kantoj tradukitaj**. Internacie konataj estas: *Annie Laurie*, *Edelweiss*, *Israela Lulkanto* k. a. .

* Ĥor-Gvidanto: Konisi Gaku, kiu ankaŭ zorgas pri aranĝado kaj tradukado.

Al *Heliko* grave mankas viraj membroj. Okaze de prezentado en la kongresoj estas petate aliĝo de kantemuloj el alia regiono.

Interesatoj kontaktu Konisi Gaku ĉe : konisi@wombat. zaq. ne. jp

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

*"Espera Mondo"* el Suda Koreio

En Suda Koreio la muzika trupo *«Espera Mondo »* prezentas koreajn tradiciajn artaĵojn en espe

En 2002, en Seulo okazis la Azia Esperanta Kongreso, en kiu *« Espera Mondo »* prezentis tradukitan korean popolkanton *« Arirang »* kaj aliajn kantojn en esperanto, krome ili ankaŭ havas multajn talentojn (tambula ludo, danco, ktp. ).

En 2003 *« Espera Mondo »* spektaklis ankaŭ en Ĉinio ĉiutage dum unu semajno po unu horo.

Kvankam *« Espera Mondo »* ankoraŭ ne surbendigis KDon, ĝi multe kontribuas en la landa movado, ĉar ĝi estas la ununura esperanta muzika ensemblo de Koreio.

Por kontakti reprezentanton de Espera Mondo vi povas retmesaĝi al : sono-1004@hanmail. net aŭ viziti la TTTejon kiu bedaŭrinde estas preskaŭ tute en la korea www. esperamondo. com



**Jacques Yvart** kantos **Georges Brassens** dum koncerto ĉe la **55aRegiona staĝo en FR-VERDUN**

«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»«»

Vi povas amplekse disvastigi tiun ĉi informleteron.

Se vi ricevis ĝin pere de amiko aŭ konatulo kaj se vi deziras ricevi rekte la venontajn, bonvolu inskribiĝi ĉi tie :

http://www. vinilkosmo. com/?scb=&lng=e

Por malaliĝi nia listo kaj ne plu ricevi tiun informleteron, simple alklaku tiun ligon :

http://www. vinilkosmo. com/?rmv=&lng=e

*Dankon pro via atento.*

*Plej muzikajn salutojn al ĉiuj legantoj !*

*Redaktita por vi de **Floreal Martorell ( Flo ! )***

*Por persona kontakto bonvole uzu :* floreal@vinilkosmo. com



ankaŭ sur breto de via diskoteko tiu **originala KD de Morice Benin tute en esperanto**

# Niaj legantoj verkas

… de nia samideano Raymond RENARD, el Châlons-en-Champagne, ni ricevis tiun poemon, kiun li verkis antaŭ kelkaj jaroj…

*En profundo de mia kor'*
*Kuŝas freŝiga ĝardeno.*
*Ofte vespere kiam l' or'*
*De la subiranta suno*
*Iom post iom paliĝas*
*Tra ĝi promeni mi ŝatas...*

*Meze de mia ĝardeno*
*Altiĝas arbo fiera,*
*Ĝi nomiĝas **Libereco**.*
*Ĉirkaŭ ĝia trunko firma*
*Ĉiuj en rondo freneza*
*Dancas per paŝo malpeza...*




*Rememoroj en ĝi kreskas*
*Senmortaj floroj de l'tempo.*
*Esperoj en ĝi multiĝas*
*Certigantoj de l'estonto.*
*Nur dubojn oni ne trovas,*
*Kiuj feliĉon elpuŝas...*

*Ĉirkaŭe de mia ĝarden'*
*Stariĝas blanka barilo*
*Mi nomis ĝin **Egaleco**.*
*Neniu deziras transen'*
*Gapvagadi postkurante*
*Iluziojn senespere...*




*De mia kor' en la ĝarden'*
*Ĉiuj miaj geamikoj*
*Promenadas ĉiumaten'*
*Brak' en brako, ĉe l'okuloj*
*Fajreron de l'amikeco*
*Filino de l'Eterneco...*

*Ene de mia ĝarden'*
*Ŝvebas freŝiga aero*
*Ĝia nom' estas **Frateco**,*
*Oni spiras ĝin sen ŝparo.*
*Tie regas ĉion Amo,*
*Tie regas feliĉego...*



*Raymond Renard*

## Mazi en Gondolando

**Konatiĝu kun la plej moderna aŭdvida Esperanto-kurso:**

**"MAZI EN GONDOLANDO"**


**La kompleto konsistas el:**

- **2 vid-bendoj**
- **1 kasedo kun kantoj**
- **1 libro kun la dialogoj kaj multaj bildoj**
- **1 libro "Ekzercu kaj ludu"**

**La tuto nur por 39 eŭroj + 5,10 eŭroj por la sendkostoj!**

**Mendebla ĉe:**

S-ro André GROSSMANN,
5, rue des Pyrénées,
68390 BALDERSHEIM, Francio
andreo.gr04@free.fr
Pagebla per poŝtĝiro aŭ sendo de ĉeko je la nomo de: Espéranto France-Est CCP 1997 72W NANCY




**Informo de Claude ROUX .... ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ...**

*Mi skribis al la granda firmao de tiparoj **Linotype** por demandi ĉu iliaj **Opentype** tiparoj inkludas la ĉapelitajn literojn de E. (mi precizigis iliajn unikodjan numerojn k nomojn) kaj ricevis ĝojigan respondon : <u>ĉiuj Opentype tiparoj de Linotype inkludas la E-ajn ĉapelitajn literojn</u> ! Do le E-istoj povas elekti inter 1100 tiparoj de Linotype. Gratulon al **Linotype**, veon al **Adobe** !*


═══

**Information de Claude ROUX (trad.) :**

*J'ai écrit à la grande firme de polices de caractères **Linotype** pour demander si leurs polices **Opentype** incluent les lettres accentuées de l'espéranto (j'ai précisé leurs numéros et leurs noms Unicode) et j'ai reçu une réponse réjouissante : <u>toutes les polices Opentype de Linotype incluent les lettres accentuées de l'espéranto</u> ! Les espérantistes peuvent donc choisir entre 1100 polices de caractères. Bravo à **Linotype**, Houuuu à **Adobe** !*

═══

GAZETARA SERVO DE SAT-AMIKARO
SERVICE DE PRESSE DE SAT-AMIKARO




" … Mi malbonodoras ?...
Tamen mi banas min ĉiutage !
- Nu, vi devus renovigi la akvon de tempo al tempo !"




… une"bulle " du dessinateur Reiser ( document extrait du site électronique du magazine étudiant bilingue français-espéranto "HADES" )
… à consulter d'urgence !
http://hades-presse.com




" Pri kio ci songîs ĉi-nokte ?
- Ke la domposedando forpelis min pro ne pagita luprezo ! "



## ... pour des messages "dans le vent"...

### ‣ L'emoticon, plus connu sous le nom de "smiley" :-) a 20 ans !

**Scott Fahlman, est-il un homme heureux ? Qui sait... En tout cas, il est bel et bien l'inventeur du "smiley" ;-) qui célèbre aujourd'hui ses 20 ans**

Le 23/09/2002 à 16:15

;-)

Le "smiley" qui ponctue les e-mails de visages rieurs ou agacés pour représenter une émotion, a eu 20 ans jeudi dernier.

Aujourd'hui, le classique :-) et ses nombreuses variantes grimaçantes :-( ou ;-) ou encore :-o sont devenus des incontournables de la communication en ligne, de l'e-mail au 'chat', en passant par la messagerie instantanée.

Son inventeur, Scott E. FAHLMAN, titulaire d'un Ph.D en intelligence artificielle du Massachusetts Institute of Technology (MIT), est actuellement chercheur en informatique (Principal Research Computer Scientist) du département Computer Science de la Carnegie Mellon University de Pittsburgh – PA.

Scott E. FAHLMAN travaille notamment sur les réseaux neuraux, une technique informatique qui cherche à imiter l'activité cérébrale humaine...

En 1982, Mr.FAHLMAN transmettait innocemment un message électronique suivi d'une combinaison de signes de ponctuation qui représentait en fait un petit visage souriant, :-). Le "smiley" était né.

Qui n'a pas utilisé de "smilies" dans un e-mail ? Les irréductibles, bien sûr, et il y en a car le smiley agace.

Même son inventeur se lasse : "J'ai très certainement passé dix fois plus de temps à en parler, qu'il ne m'en a fallu pour l'inventer. Avec un peu de chance, ma carrière de chercheur s'enrichira d'autres choses à plus long terme", a-t-il déclaré à Reuters.

Pourtant, sauf pour les non-initiés, de l'adolescent pré-pubère du Queens aux golden boys & girls de Wall Street le succès de "l'emoticon" est total.

Scott E. FAHLMAN ne touche pas de royalties pour l'utilisation de son "smiley", car comme il le dit lui même : "Si les gens devaient payer, personne ne l'aurait utilisé".

**▾ plus d'informations**

‣ http://www-2.cs.cmu.edu/~sef/sefSmiley.htm

🖂 Ariane Beky
http://www.neteconomie.com/perl/navig.pl/neteconomie/infos/article/20020923161553

Bisou
:-X
Censuré
:-#
Clin d'œil
;-)
Fâché
(-&
Gde surprise
< :-0
Gds cris
:-0
Humour
:-)
Incroyable
:-C
Malade
(:-$
Message douteux
(0-<
Délaissé
:-<
Plaisantin
:*)
Qu'est-ce ?
:-I
Question stupide
< :-)
Rires
:-)))
Sérieusement
:/)
Sceptique
:/I
Très triste
( :-(
Tu te moques
:-B
Tu plaisantes
(@@)
Vous comprenez ?
>@%&$%&

---

## Comment "Télérama" conçoit ses forums!...

(Un de nos lecteurs, professeur de langue et espérantophone, -abonné de "Télérama" !-, suite à son désir de participation informative à un forum spécifique, s'est vu adresser la réponse suivante :

" *Bonjour. Merci de votre participation à nos forums. Ces espaces de discussion, vous l'imaginez bien, ne peuvent pas être constamment des relais. Beaucoup ont déjà largement milité ici en faveur de l'espéranto, et tout le monde a compris; insister encore serait particulièrement incongru.*

*Téléramicalement vôtre* ...".

---

# Finiĝis la Abon-periodo 2003

La abon-periodo 2003 jam finiĝis per la lasta numero 124. Ĉi-tiu numero 125 jam estas la unua de la jaro 2004. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 126 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2004. La adres-etikedo de via **Informilo** informas vin per la mesaĝo **"Lasta Numero!!"**, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al **La Informilo**. Se efektive tia mesaĝo troviĝas sur ĝi, tiam bonvolu senprokraste pagi vian abonon laŭ la ĉi-suba tarifo.

La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.) kaj eventualo pago por la sekvanta jaro 2005.

| JAROJ: | 2004 | 2005 | 2006 |
|---|---|---|---|
| Abonoj por adresoj en Francio: | 12 eŭroj | 12 eŭroj | 12 eŭroj |
| Abonoj por adresoj ekster Francio: | 16 eŭroj | 16 eŭroj | 16 eŭroj |
| Federacia kotizo: | 5,70 eŭroj | 6 eŭroj | 6,30 eŭroj |

**Vi povas pagi la koncernan sumon:**

1. **Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:**
   **Esperanto France-Est poŝtĉekkonto 1997 72W NANCY**
   Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo.
   La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto:
   ekzemple: abono Informilo + kotizo 2004 por 1036
2. **Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY sendita al jena adreso:**
   S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio
   Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, al Inter Ni, kotizo, disko, donaco al .... ktp
   Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.
3. ~~**Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA**~~
   **Ludwigshafen**, je la nomo de: **Hans-Dieter Platz**. (menciu la celon de via pago)
4. **Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150    BIC : PSSTFRPPNCY**
   (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)

La kasisto: André Grossmann

| *Inter Ni* | **Eblas samtempe pagi vian abonon por 2004 al la malagasa revuo *Inter Ni* laŭ la jenaj tarifoj. Novaj abonantoj ricevos la lastan numeron de 2003** |
|---|---|
| Subtena abono | 18 € |
| Simpla abono | 14 € |
| Abono en nepagi-povaj landoj | 10 € |

# Niaj donacintoj en 2003

Ni sincere dankas al niaj malavaraj donacintoj, kiuj helpis al nia federacio.

**Donacoj por la federacio:** S-ro Charles LUDERER 42,50 eŭroj; S-ino Odette SCHEIDEL 20 eŭroj; S-ro Bertrand DENIS 16,80; Diversaj 5 eŭroj

**Sume: 84,30 eŭroj**

# NI PROVU ... ... RIDETI !



Kamiono haltas je ruĝa trafik-lumo. Malantaŭ, blondulina elaŭtiĝas, kuras al la pordo de la stiranto, frapas... La vitraĵo subenglitas...
*"Bonan tagon, mia nomo estas Helena kaj mi avertas vin, ke vi perdas la kamion-enhavon !... "*
La stiranto silentas, rekluĉas... Sama evento je la sekvanta trafik-lumo... Kiam je la tria, la blondulino reaperas, la kamionisto finfine diras :
*" Bonan tagon, mia nomo estas Alberto ! Vintras, neĝas... kaj mi vole jetas salon sur la ŝoseon !..."*

✪

Tiu viro alparolas pastron :
*" Patro mia, mi estas tute senriproĉa Kristano. Mi ne trinkas, mi neniam vizitas kafejon, mi ne malfidelas je mia edzino, mi eĉ ne okulumas al la aliaj virinoj, mi neniam elhejmiĝas vespere, mi frue enlitiĝas...*
*- Gratulinde, filo mia... Sed ĉu tio ne riskas ŝanĝiĝi, kiam vi forlasos ĉi tiun lokon ?.. "* respondis la pastro ... de la karcero !

✪

Iu virino vekiĝas dumnokte kaj konstatas, ke la edzo ellitiĝis... Li sidas silente en la kuirejo, antaŭ taso da kafo... kaj forviŝas larmon...
*"Kio do okazas, karuleto mia ?*
*- Ĉu ci memoras nian unua rendevuon? ci estis nur 16 jaraĝa...*
*- Jes, jen memorinda evento !*
*- Ĉu ci memoras ankaŭ, kiam cia patro, kiu estis policisto, malkovris nin sur la malantaŭaj seĝoj de la veturilo ?*
*- Kiel mi povus forgesi tion, karulo ?...*
*- Ĉu ci memoras plie, kiam li premis sian revolveron sur mian tempion kriante... Aŭ vi edzinigas mian filinon, aŭ mi sendigas vin en karceron dum dudek jaroj !...*
*- Karuleto mia, jes ! Kia memoraĵo !...*
La edzo forviŝas alian larmon kaj balbutas : -
*"Ni vere stultas, kiam ni junas... Precize hodiaŭ mi estus liberigita !... "*

✪.

En elementa lernejo, instruistino proponas al la lernantaro verki etan tekston pri konsekvencoj de grava neĝofalo... Johaneto desegnis afiŝeton, sur kiu oni povis legi : *" Lernejo ŝlosita ! "*

Juna dungito invitas la Direktoron de grava entrepreno al amika aperitivo. La juna edzino avertas : *" Ne forgesu, ke ni ne plu havas viskion, sekve ne proponu ĝin al la ĉefo !... "*
Sed la edzo forgesas la averton kaj insiste ofertas la aluditan alkoholaĵon. Tute neatendite, la invitito stariĝas kaj malvarme adiaŭas...
*" Nu, karulo, ci tute ne priatentis mian konsilon ! Ĉu vere ci ne sentis ĉiujn piedbatetojn, kiujn mi dediĉis al ci sub la tablo ?*
*- Piedbatojn ?... Absolute ne !"*

✪



En iu nokto-kabaredo, la Direktoro frapas ĉe la pordo de dancistino...
*" Hem, Sinjoro Direktoro, ne tuj eniru, nur ĉemizeton mi surhavas !... "*
Kelkajn sekundojn poste aŭdiĝas ĉarma voĉo : *" Jen, nun vi rajtas eniri... Ĝin mi forigis !... "*

✪



Ekscitita maristo alparolas la ŝipestron :
*" Komandanto, ni ĵus helpis ŝip-pereŭlon, kiu vagadis surmare en simpla sav-boateto...*
*- Gratulinde ! Venigu la povrulon en mian kabinon... "*
La savito eniras kaj estas tuj salutita de la ŝipestro je tiuj vortoj :
*" Bonvenon sur la Titanik !... "*

✪

Tiu viro alparolas pastron :
*" Patro mia, mi estas tute senriproĉa Kristano. Mi ne trinkas, mi neniam vizitas kafejon, mi ne malfidelas je mia edzino, mi eĉ ne okulumas al la aliaj virinoj, mi neniam elhejmiĝas vespere, mi frue enlitiĝas...*
*- Gratulinde, filo mia... Sed ĉu tio ne riskas ŝanĝiĝi, kiam vi forlasos ĉi tiun lokon ?.. "* respondis la pastro ... de la karcero !

✪


La juĝisto : *" Sur la loko kie okazis la akcidento, ĉu vi ne asertis al la policisto, ke neniam ĝis nun, vi ne sentis vin tiom bonstata ?*
*- Prave !...*
*- Nekompreneble ! Kial nur nun vi plendas, ke vi profunde vundiĝis je la kolizio inter la aŭtomobilo kaj via ĉareto ?*
*- Nu, mi klarigu al vi.... Kiam la policisto atingis la lokon, li ekvidis mian ĉevalon , kiu ege ĝemis pro rompita kruro... Sekve, li tuj ŝovis kuglon en la kapon de la besto...*
*Tuj poste li konstatis, ke mia malfeliĉa Boby, mia hundo, perdis rapide sian sangon sur la vojrando... Nova kuglo senigis por ĉiam ĝian suferon...*
*Nu, kiam finfine, li alproksimiĝis je mi la fumanta revolvero en la mano por informiĝi pri mia sanstato, mi opiniis, ke estus pli bone respondi, ke mi sentas min sufiĉe bonstata !... "*

✪


Junulino promenadas la unuan fojon kun junulo.
*"Mi tuj avertas vin... Mi promesis al mia patrino, ke mi respondus "ne" al ĉiuj viaj proponoj...*
*- Nu,* replikas la junulo, *tiukaze ĉu vi starigus kontraŭdiron je mia deziro kisi vin ? "*

✪

Iu ploranta virino forlasas la akceptejon de kuracisto... La sekvanta paciento pridemandas :
*"Ĉu gravas por mia najbarino, S-ino Schmitt ? Ŝi vere aspektas profunde deprimita...*
*- Memevidente! Mi anoncis al ŝi, ke ŝi estas graveda!*
*- Sed ne eblas! Ŝi ja estas pli ol 60 jaraĝa!*
*- Jes, ne eblas... sed tiu anonco estisl la sola rimedo por forigi ŝian hikon ! "*



# DISTRA ANGULO



## " Silab"-enigmo ========== ☆

Helpe de la ĉi-subaj vort-eroj alfabete ordigitaj, malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, donos proverbon de Zamenhof.

**ab ag al al an ba bro co ĉa da den di dlu do dol dri ek ek en fo fu ga im in jor ki ki klu ko ko koj kri la le li lip lir lu me mo mo mo nas ne ni nio no no nov of ok ol ono or or pi pla ra ra ro ro so sol sta sti to to to tri zi zio zo**

1 + - - + - - - lando rande de Adriatiko
2 + - - + - - - urbo en Sud-Ameriko
3 + - - + - brui kiel rivereto
4 + - - + - - - monato
5 + - - + - kokinbleki
6 + - - + giganta mar-mambesto
7 + - - + - agrable impresanta la guston
8 + - - + - - korpo-parto
9 + - - + - perlabori
10 + - - + - - - - tutmondaj sportludoj
11 + - - + - - randvoja avertilo
12 + - - + - - - - korpoparto
13 + - - + - eligi el si idon
14 + - - + - - brogi vegetaĵon
15 + - - + - - - konstru- aŭ mebloornamo
16 + - - + - - favorkora donaco
17 + - - + - - - - usona urbo
18 + - - + - - malrespekte ĉagreni iun
19 + - - + - lumiga gaso
20 + - - + - - - punkta ĉielfenomeno
21 + - - + - - malgaja
22 + - - + - - - asocio de kredantoj
23 + - - + - - - -poseda adjektivo
24 + - - + - - parto de cerba ŝelo
25 + - - + - - - - vesto-fermilo
26 + - - + - - - - 21-a de junio

## Stvbrnz ========☆

Sub tiu kodigita teksteto kuŝas konfideco de **Albert Einstein** (ĉerpita el leginda biografio -franclingva- verkita de François de Closets *"Ne diru al Dio, kion li devas fari ").*

Ĉiuj literoj estas anstataŭitaj per aliaj.

Ekzemple, ĉiuj **k** estas fakte **d**, tamen la litero **r** kuŝas je sia preciza loko…

**Pns osunĵpĥ vĵgsĵ niĵgnilgs ĵvigĥ, ĵvigĥ lnf oĥĵvksĵ pni orĥ hs ĵnpohs lnshĥ lv niknainasĵ pni hs oviĵĥ lv ĝĥpĥd oĥmsĵ pĥrgnan shnsdi ĝĥpĥdi !**



Solvoj de la lastaj enigmoj

1/ - "silab-enigmo" - *unu amiko malnova pli valoras ol du novaj*

2 - "stvbrnz"- *neniu estas freneza por preferi militon al paco ; dum paca periodo, filoj entombigas siajn patrojn, dum milita periodo, patroj entombigas siajn filojn.*

Ricevos libron tri solvintoj de la enigmoj : *Bernard BEHRA (68290 Masevaux), Monique BICHE (10000 Troyes), Michèle GUINGOIN (10000 Troyes). Gratulon* !

# La piedmigrantoj

✪

**En kiu pejzaĝo piediris ĉiu partoprenant(in)o ? Kiom longa estis la piedirado de ĉiu ? Kiom da tempo dediĉis ĉiu al tiu piedirado ?**

1 – La piedmigrado de Ingrid daŭris unu horon pli ol tiu okazinta en erikejo, sed unu horon malpli ol tiu 12 k-ojn longa.
2 - Ludoviko piediris pli longan distancon ol tiu de la persono en arbaro, sed malpli longan ol tiu de la persono, kiu piediris dum 5 horoj.
3 – La piedirado de Francisko superis je 5 km-oj tiun de la persono, kiu piediris dum 3 horoj.
4 – La piedirado de Margareta daŭris pli longtempe ol la piedirado 5 km-ojn longa, sed malpli longtempe ol tiu okazinta en dezerto.
5 – La piedirado 8 km-ojn longa daŭris 1 horon pli ol tiu de Henriko, sed 1 horon malpli ol tiu okazinta en valo. Margareta **ne** piediris 8 km-ojn…



| | | loko | | | | | distanco | | | | | daŭro | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | dezerto | arbaro | erikejo | montaro | valo | 5 km | 8 km | 10 km | 12 km | 15 km | 1 h | 2 h | 3 h | 4 h | 5 h |
| | | A | B | C | D | E | F | G | H | I | J | K | L | M | N | O |
| antaŭnomo | Margareto | 1 | | | | | | | | | | | | | | |
| | Francisko | 2 | | | | | | | | | | | | | | |
| | Ludoviko | 3 | | | | | | | | | | | | | | |
| | Ingrid | 4 | | | | | | | | | | | | | | |
| | Henriko | 5 | | | | | | | | | | | | | | |
| daŭro | 1 h | 6 | | | | | | | | | | | | | | |
| | 2 h | 7 | | | | | | | | | | | | | | |
| | 3 h | 8 | | | | | | | | | | | | | | |
| | 4 h | 9 | | | | | | | | | | | | | | |
| | 5 h | 10 | | | | | | | | | | | | | | |
| distanco | 5 km | 11 | | | | | | | | | | | | | | |
| | 8 km | 12 | | | | | | | | | | | | | | |
| | 10 km | 13 | | | | | | | | | | | | | | |
| | 12 km | 14 | | | | | | | | | | | | | | |
| | 15 km | 15 | | | | | | | | | | | | | | |

| antaŭnomo | loko | distanco | daŭro |
|---|---|---|---|
| Margareto | | | |
| Francisko | | | |
| Ludoviko | | | |
| Ingrid | | | |
| Henriko | | | |

Iu profesoro pri psikologio prelegas… *"Sin submeti al trinkado de alkoholaĵo igas foje gravan problemon dum la vivo de paro... Ofte la edzino forlasas la edzon, ĉar li ne modere trinkas... "*. Tiam, unu el la aŭskultantoj, iom ebria, demandas :
*- Praktike, kian kvanton proksimume tage oni devas trinki, por okazigi tion ?.. "*

Du studentoj, sidinte apudapude dum la ekzamensesio, pridiskutas la malfacilecon de la proponita disertacio…
*" Ĉu sukcesis al ci verki ion interesan ?*
*- Absolute ne ! Imagu, ke mi redonis tute blankan folion !*
*- Kia bedaŭrinda ago !... Ankaŭ tutsame mi faris !... La korektonto opinios, ke ni ŝtelkopiis reciproke !... "*

En te-salono, malkontenta gasto vokas la kelnerinon :
*"Diru al mi, Fraŭlino, Mi ĵus gustumis peceton de tiu kukaĵo... sed ĝin certe oni kuiris hieraŭ ?*
*- Hm, jes Sinjoro...*
*- Nu, kukaĵon kuiritan hodiaŭ mi deziras !*
*- Nenia problemo, revenu morgaŭ ! "*